


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2016



La du preĝejoj de Hämeenlinna, p. 10–11

Esperanton kesäkurssi lisalnessa

– Somera kurso en lisalmi 14.–17.7.2016, p. 4–6

♦ **Konata gramatikista triopo: Kalocsay – Waringhien – Wennergren, p. 7**

♦ **Invito al festo por la vivo, p. 14–15**

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300
Kansi/Pärm/Kovrile: La preĝejo nokte, Foto: Robert Bogenschneider

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com
Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ arja.kuhanen@netti.fi
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:
Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi
Andrei Dumitrescu, ☎ 040 411 6579 ✉ dumiac@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 264 2742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Facile fondita, peze paŝanta

Guste antaŭ jaro, 19.4.2015, elektigis la nuna parlamento de Finnlando, kaj tri-dek tagojn poste enoficiĝis nova registaro de tri partioj kun suma parlamenta apogo de 124 el 200. La proporcio estis sama kiel en 2011, kiam komencis la antaŭa registaro de ses partioj – sed antaŭ la fino de ĝia periodo, tiun registaron forlasis du el la ses partioj kaj ĉefministro *Jyrki Katainen* forlasis Finnlandon fariĝinte vicprezidanto pri laborejoj, kresko, investoj kaj konkurencopovo de la EU-komisiono; fine la registaron apogis nur 102 parlamentanoj el 200.

Tiam, antaŭ jaro, ĉi-paĝa rubriko estis "Facile fondita registaro", malkiel antaŭ kvin jaroj. La tri grandaj, centra, "la finna" kaj konservativa, trovis unuj la aliajn, interkonsentis pri kvarjara registara programo kun striktaj malaltigoj de publikaj elspezoj kaj malkomplikigo de la administrado.

La registaro estis – almenaŭ ŝajne – facile fondita, sed rapide amasiĝis problemoj. Ĉefministro *Juha Sipilä*, inĝeniero brilsukcesinta kiel direktoro kaj posedanto de firmao produktanta elektronikaĵojn, post forvendo de sia firmao milionulo, proponis inter salajruloj kaj laborigantoj "socian kontrakton". Tiu malaltigu la prezon de laboro je kvin procentoj. Laŭ la registaro tio estus absolute necese por solvi ka aktualan financan krizon. Tia reduktio efektiviĝu per plilongigo de jara labortempo kaj reduktio de kromhora rekompenco. Se la labormerkataj organizaĵoj ne konsentus je tio, la registaro forigus ilian leĝan rajton interkonsenti kaj ordonus kondiĉojn. Estas memkompreneble, ke en socio kia la Finnlanda, kie la labormerkato baziĝas sur interkonsenta kontrakto, tio estis skandalo ĉe la laborista flanko kaj indigne malakceptita. Provo de rekta kaj strikta "socia kontrakto" (jes, la registaro efektive nomis ĝin tiel, sed Sipilä ne estas la unua patro de tia misuzo de la klasika nocio) malsukcesis



kvarfoje. Nur 29.2. ĉijare (senintence komika dato) la labormerkataj centraj organizaĵoj subskribis "kontrakton pri konkurencopovo". Sed ĝin ne aprobis ĉiuj sindikatoj, sekve perturbaĵoj estas atendeblaj.

Granda kaj akre pridisputata problemoj fariĝis la ŝajne neatendita amasa rifuĝado en Eŭropon el krizaj areoj. Al Finnlando venis dum 2015 preskaŭ 33 000 rifuĝintoj petantaj azilon, pli multe ol sume iam antaŭe. Ke Finnlando ne fermis la limojn, kaŭzis kaj kaŭzas malakordojn interne de la registaro, el kies konsistigaj partioj "la finnoj" gajnis subtenon parte kontraŭante enmigradon. La registara perspektivo ja estas malfermeco al diverseco (kaj allogi produktivajn profesiulojn), sed la Eŭropan problemaron kiun kaŭzas (ja dependas de vidpunkto) la kolonia kaj milita historio de Eŭropo mem, ĝi ne povis aŭ volis antaŭvidi.

Edukado kaj kulturo ankaŭ suferas reduktajn, kio kompreneble ne estas akklamata ĉe koncernaj institucioj (i.a. universitatoj devas amase eksigi, eĉ profesorojn) kaj personoj. Kolizias la vidpunkto klasika pri kulturo kaj civilizo kontraŭ tiu pri komerca konkurencopovo pere de praktikaj aplikoj. Viktimoj en tia batalo estas ankaŭ lingvistiko kaj lingvoinstruado en altlernejoj kaj gimnazioj.

Nia Esperantujo ne estas regata de ŝtataj organoj, sed influas kion ili faras kaj favoras. Tio estas nia esperantista intereso.

Tuomo Grundström

Esperanton kesäkurssi Iisalmessa – Somera kurso en Iisalmi 14.–17.7.2016

Kursejoj, kurssipaikat: Nerkoonniemen kylätalo, Nerkoonniementie 1301 kaj bieno de Onni Kauppinen, Uudispihantie 298

Ĉefinstruisto, *pääopettaja:* Gražina Opulskienė; Helpanta instruisto kaj kursorespondeculo, *avustava opettaja ja kurssivastaava:* Tiina Oittinen; Kursestro, *kurssi-isäntä:* Onni Kauppinen

Jam venis kelkaj aliĝoj por nia somera kurso en Iisalmi. En tiu ĉi gazeto estas la detala programo, en kiu vi vidas kio atendos vin. Dum la lecionoj kun Gražina kaj Tiina vi povos ripe-ti tion, kion vi jam scias kaj lerni pli diskutante kaj farante amuzajn, sed lertajn ekzercojn. La elementa grupo nature komencas de la unuaj aferoj. La kursejo situas en la kamparo proksime al la bieno de Onni Kauppinen. En la libertempo ni ĉiuj estas kune kaj uzas Esperanton same vigle kiel dum la lecionoj. Ni lernos certe tre multe de la kampara vivo kaj konatiĝos kun ties vortaro, kio eble ne estas en aktiva uzo por ni ĉiuj. Vi vidos en la programo, ke ĝi enhavas ne nur pasivajn vizitojn kun la vidindaĵoj de la regiono, sed ankaŭ multajn praktikajn laborojn.

Kursokotizoj (13.–17.7.): La kursokotizoj inkluzivas instruadon, manĝaĵojn, kafojn, plej grandan parton de la ekskursaj kostoj kaj ankaŭ laŭbezone transportojn el Iisalmi kaj reen. Kotizoj: 55 € po tago (inkl. ankaŭ tranoktadon en la amasloĝejo ĉe la bieno de Onni, parte tendaro). 40 € po tago (mem-aranĝita tranoktado, ekzemple en hotelo en Iisalmi). La kotizon vi pagos kontante surloke, *informiĝu ĉe Tiina*, la sekretario de EAF.

Aliĝoj al la sekretario de EAF: *Tiina Oittinen*, eafsekretario@esperanto.fi, tel. +358-50-5494709. Informojn pri kursopraktikajoj donas ankaŭ *Onni Kauppinen*, tel. +358-500-813530.



Gražina Opulskienė,
fotis TO



Onni Kauppinen, fotis
Gražina Opulskienė

Sekvu ankaŭ informojn en niaj retpaĝoj.

Iisalmen kesäkursille on tullut muutama ilmoittautuminen sekä alkeis- että jatkoryhmään. Kieleen vasta tutustuvat aloittavat alkeista ja jatkoryhmä taas kertoo jo aiemmin oppimaansa sekä oppii uutta. Opettajat Gražina ja Tiina opettavat molempia ryhmiä. Kansainvälistä kieltä käytetään totta kai myös vapaa-aikana, jolloin mm. osallistumme maatalon töihin ja tutustumme paikkakunnan nähtävyyksiin yhdessä. Katso ohjelmasta mitä kaikkea on suunnitteilla.

Kurssipaikka Nerkoonniemen kylätalo sijaitsee lähellä Iisalmen Esperantokerhon puheenjohtajan Onni Kauppinen maatilaa.

Kurssimaksu on 55 €/vuorokausi, jos yöpyy Onnin maatilalla yhteismajoituksessa (osin tel-tassa). Jos valitset muun yöpymispaikan (esim. hotellin Iisalmessa) kurssimaksu on 40 €/vrk ja lisäksi maksat itse majoituskulut. Kumpaankin kurssimaksuun kuuluu opetus, ruokailut, retkikulut pääosin sekä tarvittaessa kuljetukset Iisalmesta kurssipaikalle ja takaisin.

Ilmoittautumiset Suomen Esperantoliiton sihteeriille: *Tiina Oittinen*, eafsekretario@esperanto.fi, tel. +358-50-5494709. Lisätietoja kurssista antaa myös *Onni Kauppinen*, tel. +358-500-813530. Kurssimaksu maksetaan

joko käteisellä paikan päällä tai EAF:n tilille (kysy viitenumero sihteeriltä). Kurssista tietoja myös liiton nettisivuilla.

Huom! Kurssille on saatavissa matka-apurahaa ja stipendejä, erityisesti nuorille alkeiskurssille osallistuville (katso sivulta 8). Muista kertoa asiasta edelleen! Lisätietoja stipendeistä liiton varapuheenjohtajalta, sihteeriltä tai Paula Niinikorvelta, joka on sekä EAF:n että FEJO:n hallituksessa. Yhteystiedot s. 2.

Taga programo de la kurso, Kurssin päivittäinen ohjelma (ŝanĝoj eblas, muutokset mahdollisia)

Merkredo – keskiviikko 13.7.2016

Antaükursa ekskurso al la bieno de Onni, amuza kunestado ĉe bivakfajro kaj farado de krespoj. *Kurssia edeltävä retki Onnin maatilalle, iloista yhdessäoloa ja yhteistä letunpaistamista.* Transporto post alveno de posttagmezej trajnoj/busoj el la fervoja/busa stacidomoj al la bieno. Reen al Iisalmi laŭbezono. *Kuljetus tarvittaessa iltapäivällä rautatie- ja/tai bussiasemalta maatilalle ja samoin takaisin Iisalmeen.*

Ĵaŭdo – torstai 14.7.2016

09.00 Malfermo de la kurso, la instruistoj kaj gelernantoj prezentas sin, grupigo. *Kurssin avaus, opettajien ja opiskelijoiden esittäytyminen. Jakautuminen ryhmiin.*

09.15 Instruado. *Opetusta.* (2 h)

11.00 Kafo. *Kahvi.*

11.30 Instruado. *Opetusta.* (2 h)

13.00 Ekveturo al Iisalmi, tie lunĉo en la manĝejo de Olvi-bierhalo kaj vizito al la bierfareja muzeo. *Lähtö Iisalmeen, jossa lounas Olvin oluthallin ruokalassa sekä vierailu olutmuzeossa.*

14.15 Ekveturo al vizito ĉe loka entrepreno. *Lähtö yritysvierailulle.*

16.00 Reveno al la urbocentro de Iisalmi, tie promenado kaj konatiĝo kun la vidindaĵoj. Dumvoje kafo. *Paluu Iisalmen keskustaan, jossa tutustutaan nähtävyyksiin kävellen sekä kahvitellaan.*

17.30 Ekveturo reen al la bieno de Onni, tie saŭno kun bankuvego kaj/aŭ naĝado en la lago. Poste vespera manĝeto kaj amuza kunestado. *Lähtö takaisin Onnin maatilalle, jossa sauna ja kylpylalu sekä uintimahdollisuus järvessä. Saunan jälkeen iltapala ja mukavaa yhdessäoloa.*

Vendredo – perĵantai 15.7.2016

09.00 Instruado. *Opetusta.* (2 h)

11.00 Kafo. *Kahvi.*

11.30 Instruado. *Opetusta.* (2 h)

13.00 Lunĉo en la kursejo. *Lounas kurssipaikalla.*

13.30 Ekveturo por ekskurso al Vesanto, ĉe saliko-bieno de *Kimmo Hakala*. En la bieno ni vidos kreskigon de salikarboj kaj aĵojn faritajn el ili. Faradon de la aĵoj eblas provi mem kiel ankaŭ solvodon de la diversaj enigmaj ludiloj de Kimmo. Vespermanĝeto en la bieno. *Lähtö retkelle Kimmo Hakalan pajutilalle Vesannolle. Retkellä tutustutaan pajutilan elämään: pajuviljelmiin ja pajuesineiden valmistukseen, jota voimme itekin kokeilla. Lisäksi tutustumme Kimmon erilaisiin pulmapeleihin. Iltapala tilalla.*

19.00 Reen al Iisalmi (alveno je 20.30). *Paluu lähtö Iisalmeen (jossa perillä klo 20.30).*

Sabato – lauantai 16.7.2016

09.00 Instruado. *Opetusta.* (2 h)

11.00 Kafo. *Kahvi.*

11.30 Instruado. *Opetusta.* (2 h)

13.00 Lunĉo en la kursejo. *Lounas kurssipaikalla.*

14.00 Laborado en fojnokampo (pli-malpli volontula). Kafo. *Heinänkorjuuseen osallistumista (enemmän tai vähemmän vapaaehtoisesti). Kahvi.*

16.00 Paŭzo. *Tauko.*

18.00 Ekveturo al la bieno *Tiikkala* por vesperumo. Pri la programo zorgas lokaj talentoj. Vespermanĝo. Reveno ĉ. je 20.30. *Lähtö illanviettoon Tiikkalan tilalle. Ohjelmasta huolehtivat paikalliset taiteilijat. Illallinen. Pahuulähtö n. klo 20.30.*



Dimanĉo – sunnuntai 17.7.2016

09.00 Instruado. *Opetusta*. (2 h)

11.00 Kafo. *Kahvi*.

11.30 Instruado. *Opetusta*. (2 h)

12.30 Informoj kaj fermo de la kurso. *Tiedotteita ja kurssin päätös*.

13.00 Ekveturo al Iisalmi, tie lunĉo en la urbodomo. *Lähtö Iisalmeen, jossa lounas raatihuoneella*.

16.00 Transporto al trajnoj/busoj laŭbezone. *Kuljetus tarpeen mukaan rautatie- ja/tai bussiasemalle*.

Bonvenon al la kurso en Iisalmi!

Tervetuloa kurssille Iisalmeen!

Onni, Gražina kaj Tiina

Aŭtunaj Tagoj en Taivalkoski, Syyspäivät Taivalkoskella 24.–25.9.2016

Bonvenon al la Aŭtunaj Tagoj de EAF, ĉi-foje denove en la norda Finnlando! Ni sekvos la padojn kaj paŝojn de la verkisto *Kalle Päätalo*, kies hejmgregionojn ni vidos multflanke dum la semajnfino. Dum la vizito ni konatiĝos ankaŭ kun la fervojo, kiun dum la 2-a mondmilito konstruigis la germanoj uzante la militkaptitojn. Ni tranoktos, manĝos kaj kunvenos plejparte en la feria bieno *Saija*, kiu situas ĉe la lago *Jokijärvi*. Per propra aŭtobuso ni atingos facile aliajn lokojn en *Taivalkoski*, kiel ekz. Päätalo-centron kaj la vilaĝon *Metsäkylä*, kie situas Esperanto-barbaro kaj manĝejoj *Arbar-bar*. Nia busa vojaĝo komenciĝos



Laborĉambro de Kalle Päätalo,
Foto: Aini Vääräniemi

jam sabatmatene 24.9. el Oulu, kiun ni atingos per nokta trajno. La buso veturigos nin denove al Oulu dimanĉe. Detala programo kaj aliĝilo aperos en la junia numero de Esperanto-lehti. La sekretario de EAF

informiĝos pri komuna trajnvojaĝo el suda Finnlando al Oulu. Nun indas inviti eksterlandajn esperantamikojn al la Aŭtunaj Tagoj, al Taivalkoski ni ne iros ĉiam. Se vi deziras jam nun pliajn informojn, turnu vin al Aini.

Tervetuloa Kalle Päätalon tekoselkosille vietämään Suomen Esperantoliiton syyspäiviä! Luvassa on tiivis kahden päivän ohjelma, jonka pääteemoina ovat Kalle Päätalo ja sodanaikainen saksalaisten kenttärata. Tapahtuman keskuspaikka on Jokijärvellä sijaitseva Saijan lomakartano, jossa yövyimme, ruokailemme ja kokoustamme. Liikumme omalla linja-autolla Jokijärvellä, Taivalkosken keskustassa ja Metsäkylässä. Oulusta järjestetään bussikuljetus Saijaan lauantaina 24.9. aamulla. Sama auto kuljettaa meitä Taivalkosken eri kohteissa. Sunnuntaina matkustamme bussilla takaisin Ouluun ja yöjunalle. Kesäkuun Esperantolehdestä on päivien tarkempi ohjelma ja ilmoittautumistiedot. Liiton sihteeri selvittää yhteistä junamatkaa Ouluun.

Tervetuloa Taivalkoskelle, tuhansien tarinoiden pitäjään! Bonvenon al Taivalkoski, loko kun miloj da rakontoj!

Kunlabore kun EAF ĉi-foje, *liiton kanssa yhteistyössä tällä kertaa Oulun esperantoseura – Esperanto-societo de Oulu ry*

*Aini Vääräniemi
(yhteystiedot jäsenjärjestösvulla)*

Konata gramatikista triopo: Kalocsay – Waringhien – Wennergren

Sigloformaj librotitoloj PAG kaj PMEG

Antaŭnelonge mi ricevis donace el Stokholmo la kajereton "Lingva kvaronhoro" de *Paul Nylén*. La landa asocio SEF eldonis ĝin en la jaro 1933. Facile kompreneble la sveda teksto tuj kaptis min por avida seninterrompa legado. Brila sperto ĉe mia legolampo gvidis min al nova itinero. En mia hejma biblioteko staris unu apud la alia "Plena analiza gramatiko de Esperanto" (1980) kaj "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko" (2005). PAG estas kompostita en Brazilo kaj presita en Ĉinio. PMEG eldoniĝis en Kalifornio, Usono.

Finno, profesia lingvisto en la Universitato de Helsinki, prof. *Jouko Lindstedt* favore recenzis la gramatikon de la hungar-franca aŭtoro paro Kalocsay–Waringhien. Pli kritikema koncerne la verkon de *Bertilo Wennergren* estis la ruso *Alen Kris* loĝanta en la regiono de Kaliningrado. Indas tuj substreki la fakton, ke ambaŭ libroj taŭgas kaj konvenas al ĉiuj ordinaraj esperantistoj, do ne nur al lingvistoj kaj fakuloj. Kvankam la libroj estas briksimilaj 600- kaj 700-paĝaj gigantaj eldonaĵoj, ili neniel fortimigas leganton, tute kontraŭe.

Ne estis facile bridi entuziasmon ĉe brilaj ekzemplaj frazoj. Ili tuj malfermis la kvintesencon de gramatika pensado sen kromaj vortaj klarigoj. Ne necesas harfenda sinteno al gramatikaj reguloj. Praktikaj modeloj facile restas en la memoro. Poste rapide sekvas flua aplikado en la parola kaj skriba lingvaĵoj. Kvazaŭ ludante kreskas ĉies lingvoscio. En la jaro 1887 ni havis nur 16 regulojn, sed hodiaŭ la Zamenhofa Esperanto estas kultura, plene evoluinta lingvo kaj komunikilo. Ni rajtas esti kontentaj, eĉ iom fieraj pro tio.

PAG uzas tradiciajn terminojn kaj tial oni povas relative facile sekvi konsilojn. PMEG montaras novajn vojojn por studemuloj. Ĉiu povas elekti sian propran vojon. Se aperas enigma detalo, tio ne ĝenas. Kernaj klarigoj kaj ekzemploj estas plene kapteblaj, indaj por detala sekvado. Estis por mi pura ĝuo kaj ĝojo sekvi la gvidliniojn pere de trafaj ekzemplaj frazoj kaj klarigoj. Kiel lerneja knabo mi en klasika liceo uzis paralele du gramatikojn. *Streng* verkis pli malfacilan kaj profundan. *Linkomies* siavice klarigis la temon elaste kaj facile kompreneble. La menciitaj lernolibroj modele kompletigis unu la alian. Tute similan senton mi havas nun ĉe la verkoj PAG kaj PMEG multajn jardekojn pli poste.

La talenta kaj kapabla gramatikista triopo tre fekunde kaj sukcese gvidas ĉiujn legantojn. Oni ne bezonas iujn kromajn helpantojn. Jouko Lindstedt skribis en marto 2016 en la *Ondo de Esperanto* sub la titolo "Se Esperanto estas tiel facila, kial oftas eraroj en tekstoj?" Jouko aludas al la akuzativo kaj ĝia finaĵo. Mia rekomendo tekstas: Foliume tralegu la verkon PMEG, kiun vi ankaŭ trovas en la reto. Tio helpas vin eviti malagrablajn erarojn. La strukturo de la finna lingvo favoras ĝustan gramatikan uzadon en Esperanto.

Veterano ĝojas kaj ĝuas pro gramatikaj detaloj. Verŝajne des pli kontenta estas pli juna generacio en la sama laboro. Ne plendu pro forta tempomanko! Ni sekvu la mesaĝon de la konata poemo "La Vojo" de d-ro Zamenhof. "Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan! Eĉ guto malgranda konstante frapante, traboras la monton granitan."

Jorma Ahomäki
Marto 2016

Vojaĝstipendioj por junuloj – Matka-apurahoja nuorille

Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) ofertas tri stipendiojn al junuloj por partopreni iun esperantoaranĝon. La stipendioj valoras maksimume po 400 eŭroj kaj celas kovri la partoprenkaj vojaĝkostojn.

La stipendipetantoj rajtas mem elekti la partoprenotan aranĝon, kiu povas esti ekzemple la somera kurso de EAF en Iisalmi aŭ iu internacia evento kiel Internacia Junulara Kongreso (IJK). Ekzemple ĉe www.eventoj.hu troveblas multaj eblaj aranĝoj.

La kondiĉoj estas, ke la ricevanto jam konas la elementojn de Esperanto kaj estas preta post la vojaĝo raporti pri sia partopreno en Esperantolehti.

La liberforman peticion oni direktu al la estraro de EAF kaj sendu al estrarano Paula Niinikorpi retpoŝte (paula.niinikorpi@gmail.com) preferinde antaŭ la celata vojaĝo aŭ plej laste la 31-an de majo 2016. Ŝi donas laŭbezone ankaŭ pliajn informojn.

Suomen Esperantoliitto jakaa kolme matka-apurahaa nuorille esperantotapahtumaan osallistumiseksi. Apurahoilla on tarkoitus kattaa

matkaajien osallistumis- ja matkakulut, ja ne ovat suuruudeltaan kukin korkeintaan 400 euroa.

Apurahan hakija voi vapaasti valita tapahtuman, johon osallistuu. Kohde voi olla esimerkiksi Esperantoliiton järjestämä kesäkurssi Iisalmessa tai jokin kansainvälinen tapahtuma kuten Internacia Junulara Kongreso (IJK). Esimerkiksi sivustolta www.eventoj.hu löytyy melko kattava listaus esperantotapahtumista.

Hakuehtona on esperanton alkeiden osaaminen. Matkan jälkeen tulee myös kirjoittaa raportti Esperantolehteen tapahtumaan osallistumisesta.

Vapaamuotoiset hakemukset osoitetaan Suomen Esperantoliiton hallitukselle ja toimitetaan hallituksen jäsen Paula Niinikorville sähköpostitse osoitteella paula.niinikorpi@gmail.com mielellään ennen aiottua matkaa tai kuitenkin viimeistään 31.5.2016. Paula Niinikorpi antaa tarvittaessa myös lisätietoja.

*La estraro de EAF
– Esperantoliiton hallitus*

ELFI informas

ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj) havis siajn elekto- kaj estrarkunsidojn la 12-an de marto dum Vintraj Tagoj de EAF en Hämeenlinna. Estraro por la jaro 2016 estas jena:

- *Sylvia Hämäläinen*, prezidanto (sekciestro de ILEI)
- *Raita Pyhälä*, vicprezidanto
- *Tapani Aarne*, sekretario
- *Paula Niinikorpi*, kasisto
- *Tuomo Grundström*, estrarano
- vicestaranoj: *Tiina Oittinen* kaj *Synnöve Mynttinen*
- agadkontrolantoj: *Katriina Muurainen-Särkkä* kaj vice *Anja Karkkainen*.

La jarkunsido decidis, ke la membrotizoj de ELFI por la jaro 2016 estas jenaj:

- MIPR – 28 € (IPR papere)
- MJA – 36 € (IPR rete + Juna Amiko)
- MI – 18 € (IPR rete)

Bv. vidi precize pri la agado de ELFI ĉe la retejo: www.esperanto.fi/elfi/Etusivu

sekretario

Esperantonuoret festareilla – Junuloj en la festivalo Maailma kylässä

Nuorten esperantoliitto FEJO esittelee taas toimintaansa ja esperantoa Helsingissä 28.-29.5.2016 pidettävällä Maailma kylässä –festiivaalilla.

Maailma kylässä on ilmainen, koko perheelle suunnattu kulttuurifestiivaali, jossa mm. eri kansalaisjärjestöt esittelevät toimintaansa. Tämän vuoden teemana on solidaarisuus, ja tarjolla on niin teatteria, tanssia ja taidetta kuin keskustelua, kirjallisuutta ja eksoottista ruokaa. Nettisivuilta www.maailmakylassa.fi löytyy lisätieto tapahtumasta ja tarkka ohjelma.

Esittelypöytäme sijaitsee Mahdollisuuksien tori –teltassa Kaisaniemen puistossa. Mikäli haluat auttaa esittelytoiminnassa, ota yhteyttä Paula Niinikorpeen sähköpostitse, paula.niinikorpi@gmail.com.

Tervetua vierailemaan esittelypisteellämme!

La junulara asocio FEJO prezentos sian agadon kaj Esperanton en la festivalo *Maailma kylässä*, kiu okazos en Helsinki la 28-an kaj 29-an de majo 2016.

La multkultura festivalo estas senpaga kaj celata por la tuta familio. En la programo estos diversaj artaĵoj, teatro kaj danco krom diskutoj, literaturo kaj ekzotikaj manĝaĵoj. Aldone multaj asocioj kaj organizoj prezentas sian agadon. Pliaj informoj kaj detala programo aperas en la retejo www.maailmakylassa.fi.

Nia stando situos en la tendo ”Foiro de Eb-lecoj” (Mahdollisuuksien tori) en la parko de Kaisaniemi. Se vi pretas deĵori en nia stando, bonvolu kontakti *Paula Niinikorpi* per retroŝto paula.niinikorpi@gmail.com.

Bonvenon viziti nian standon!

ENA – Esperanto-Numismatika Asocio

Estimata samidean(in)o,
Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto en la historio de Esperanto, estis fondita en 2013 la probable unua fakgrupo ”Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun ĝia revuo ”Esperanta Numismatiko”.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro de moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudentaj artefaktoj.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur du jaroj ĝis 44 individuaj membroj kaj 15 espe-

rantaj bibliotekoj k. muzeoj, dise en la mondo.

Agrable estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: *Mi konsentas aliĝi*) kaj krome la PER-RETA revuo ankaŭ estas tute SENPAGA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo oni tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn 8 (ok!) kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-roj jare)

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en Jarlibro 2015 sur p. 68. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Kun numismatikaj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

*Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de
”Esperanta Numismatiko”*

La du preĝejoj de Hämeenlinna, kiujn la enloĝantoj komence ne ŝatis

La luterana preĝejo de Hämeenlinna

La urbo estis fondita en la jaro 1639, kaj ĝi situis unue en la norda flanko de la mezepoka kastelo. Ĝi estis mezlanda urbeto, kiu konsistis el unuetaĝaj lignaj domoj. Incendio detruis ĝin grandparte kun la preĝejo fine de la 18-a jarcento. La tiama reĝo de Svedio, Gustavo III-a ordonis, ke la urbo estu rekonstruita sur la altaĵo sude de la kastelo. Komprenoble ankaŭ nova preĝejo estu tiam starigata.

La intereso de la reĝo al la urbo mem kaj al la antikva arkitekturo influis al la konstruistaro de la preĝejo. La franca arkitekto *Louis Jean Desprez*, kiu estis vokita al Svedio kiel arkitekto de la kortumo, planis la preĝejon. La desegnaĵoj estis komence intencitaj por granda preĝejo en Stokholmo. Poste, kiam la anarkiisto *Anckarström* mortpafis la reĝon en 1792, la reganta konsilantaro opiniis, ke nova preĝejo ne plu estis bezonata en la ĉefurbo. Kiam la urbo Hämeenlinna ĝuste tiam bezonis novan preĝejon, oni decidis utiligi la pretajn planojn tie. La preĝejo estis preta en 1798, sed ĝi estis farita pli malgranda ol la planita en Stokholmo. Ĝi estis la unua en sia stilo en Finnlando. Poste la stilo estis uzata ankaŭ aliloke.

La preta preĝejo kaŭzis ŝokon inter la urbanoj, ĉar ĝi tute ne aspektis kiel tradicia eklezia konstruaĵo, sed ŝajnis renversita pota, kaj eĉ mankis sonorilturo. La paroĥanoj grumblandis, kaj minacis, ke ili ne pagos ekleziajn impostojn, antaŭ ol oni ŝanĝis la aspekton de la preĝejo.

La brika, blankkalkita preĝejo estas unu el la plej puraj reprezentantoj de la gustaviana klasisma stilo en Finnlando. Komence ĝi estis ronda unukupola konstruaĵo, planita doni aspekton de Panteono en Romo, kiun la reĝo Gustavo

III tre admiris. El la ronda bazo apartiĝis oriente sakristio kaj okcidente vestiblo kun dorikaj kolonoj en ties fasado. La interno estis aranĝita en amfiteatra formo: kun altaro en la mezo kaj ĉirkaŭe la benkovicoj en ok niveloj. La katedro estis super la pordo de la sakristio. La ekstera aspekto de la preĝejo ŝanĝiĝis plurfoje dum la tempo. Post kiam la aparta, ligna sonorilturo brulis dum la urba incendio en 1831, oni konstruis brikan turon sur la sakristio en 1837. La riparlaboroj faritaj en 1892 laŭ la planoj de *Josef Stenbäck* detruis la originalan eksteran aspekton, ĉar tiam oni rekonstruis la preĝejon krucforma kaj rearanĝis la benkojn en normala ordo. Samjare la paroĥo ricevis donace altarpentraĵon pentritan de *Alexandra Frosterus-Sältin*, kun la temo *La Savanto revelacias al Maria Magdalena dum paskomateneno*. La sekva riparado farita en 1912 laŭ planoj de *Ilmari Launis* pliigis la ornamadon per murpentraĵoj kaj vitraloj.

Dum profunda riparado en 1964 la arkitekto *Aarno Ruusuvauro* strebis al la originala, simpla etoso forigante preskaŭ ĉiujn dumtempe faritajn ornamaĵojn. La aranĝo de sidlokoj restis tamen neŝanĝita. Samokaze la preĝejo ricevis novan orgenon, konstruitan en la orgenfarejo de Kangasala. Ĝi estis modernigita en 1978.

La preĝejo de Hämeenlinna estas la ĉefa diservejo de la paroĥo Hämeenlinna-Vanaja, kaj ĝi situas en la centro de la urbo ĉe la vendoplando sur la altaĵo *Kirkkorinne*. Ĝi povas akcepti 800 homojn en la ĉefa ejo kaj 25 en la kapelo. La preĝejo situas sur la plej alta loko de la urbocentro kaj el la turo oni havas belan pejzaĝon ĉiuflanke super la urbo.

Nuntempe oni festas en Hämeenlinna jare

”Tagon de restoracioj kaj kafeoj”, kiam kiu ajn rajtas publike oferti en la urbo siajn memfaritajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn sen aparta perme-

so. Tiam funkcias provizora kafejo ankaŭ en la sonorilturo de la preĝejo, kaj la profito iras al bonfareco.

La ortodoksa garnizona preĝejo de Hämeenlinna – hodiaŭ Akompaneca domo

La ortodoksa garnizona preĝejo de Hämeenlinna estis konstruita dum la unua prepperiodo de la aŭtonomeca tempo de Finnlando. La loko estis elektita proksime de la lokaj kazernoj de la rusa armeo. Post la sendependiĝo de Finnlando la kazernoj estis konataj sub la nomo ”Suomen kasarmi” inter la aliaj kazernoj en la urbo.

La lignaj unuetaĝaj empiristilaj domoj ĉirkaŭ Malgranda placo estas konstruitaj post la granda incendio de la jaro 1831. Rusa preĝejo komence ne apartenis al la konstruplanoj de la placo. Ĝi estis indikita nur en la urboplano de la jaro 1872 kiel parcelo por garnizona preĝejo. La impona duetaĝa, bizanc-stila ortodoksa preĝejo kun alta turo estis starigita meze de la placo en la jaro 1901, en la fino de la ŝoseo, kiu kondukis de Turku al la urbo. La planon faris *N.A. Schultz*, kaj la konstruadon prizorgis la rusa armeo. La preĝejon uzis nur la rusa garnizono, kaj ĝi pretiĝis ĝuste, kiam forta premo kontraŭ la aŭtonomeco de Finnlando komenciĝis.

La preĝejo konklude fariĝis por la urbanoj simbolo de malŝatata reĝimo, kaj kiam Finnlando sendependiĝis ĝi restis kiel dolora memorigo pri la rusa premado. Kiam oni pripensadis la estontecon de la konstruaĵo, oni planis por ĝi alitipajn uzon. En la jaro 1923 oni faliĝis la kupolojn kaj turon, kaj la preĝejo estis transformita al klasisma urba biblioteko laŭ planoj de *Bertel Strömmer*. Kun la biblioteko funkciis samtempe en la konstruaĵo la loka provinca arkivo dum 1926–77. En la jaro 1983 la urba biblioteko ricevis ĉe la strato *Lukiokatu* novan propran domon, la unuan aparte planitan por tiu uzo.

Poste la konstruaĵo estis uzata de diversaj lernejoj, ekz. kiel flankaj funkciejoj de la universitato de Tampere. Tiam ĝi estis uzata por

daŭriga instruado kaj universitato por pli maljuna popolo, kaj en ĝi funkciis krome instituto por entreprenado. La konstruaĵo estis do loko de multflanka klerigo por plenkreskuloj.

Kiam la universitata uzo finiĝis, oni komencis plani novan utiligon. Komence la konstruaĵo estis kelkjure provizora ejo de bazlernejo de *Tuomela* dum la riparado de la lernejo. La urbo planis forvendi la konstruaĵon, sed oni ankaŭ decidis sondi la proponojn de urbanoj, kaj konklude oni profunde riparis ĝin en 2014 por fariĝi kunvenojo de diversaj societoj. Hodiaŭ en ĝi funkcias centro de civitana agado, Akompaneca domo, kiel komuna loĝcambro por la urbanoj.

La ĉefaj agantoj en ĝi estas Setlementa societo kaj ”Pysäkki” (Haltejo), kiu estas libervola agadcentro de la luterana paroĥo, havanta ĉ. 500 agantojn, el ili 200 aktivuloj. En Akompaneca domo funkcias hodiaŭ tuttempe pli ol dek aliaj societoj. La intenco estas, ke en ĝi povu agadi kaj kunvenadi ĉiuj aĝgrupoj, junuloj kaj maljunuloj. Ekzistas funkcioj kaj por senlaburoloj kaj por pensiuloj. Lastatempe oni komencis krome aranĝi lingvokursojn kaj hejmigan agadon por enmigrintoj.

En la konstruaĵo funkcias krome kafejo, kien oni povas facile veni por renkonti kun trinkaĵo kaj surloke faritaj bakaĵoj. Situante en tute centra loko, la konstruaĵo bone konvenas kiel kunvenojo por diversaj societoj kaj asocioj. Ĝi jam montriĝis esti vere bezonata kaj ŝatata por la urbanoj.

La tekstojn kunmetis el diversaj dokumentoj Marjatta Niemi, esperantigis Jukka Laaksonen

Forpasis Veikko Tikkanen



Veikko Tikkanen, fotis TO

Nia multjara, kara kaj fidela membro *Veikko Tikkanen* forpasis la 26-an de februaro 2016 post mallonga, grava malsano. La enteriga ceremonio kaj memorarangō okazis la 2-an de aprilo kaj tie ĉeestis kune kun la

familianoj ankaŭ proksimume dudeko da esperantistoj kaj antaŭaj gekolegaj.

Veikko naskiĝis la 12-an de januaro 1928 en Valtimo, en orienta Finnlando. Lia patro estis fervoja laboristo kaj tial la familio ofte transloĝiĝis: fakte preskaŭ ĉiuj de la 6 gefratoj naskiĝis en diversaj lokoj de la lando. Ne estis eble por Veikko regule viziti la lernejon en sia juneco, sed kiel plenkreskulo li tamen povis fari la abiturientan ekzamenon kaj poste studi i.a. ekonomion. Al Turku li transloĝiĝis en la 1960-jaroj, kiam li ricevis postenon kiel ekonomia ĉefo de la profesia lernejo. Post tiu tempo Turku estis lia hejmurbo kaj li plej longe vivis en la urboparto Vienola.

En la Esperanto-societo de Turku Veikko membriĝis en la jaro 1966 kaj estis bonvenigita

en la membroletero Informilo n-ro 24 aprile en tiu jaro. En la societo li dum jaroj havis diversajn taskojn: li estis prezidanto same kiel sekretario por multaj jaroj, sed plej longe ni memoras lin kiel nian libroteniston, kiun taskon li plenumis ankoraŭ por la jaro 2014. Sed Veikko ne okupis sin nur pri ciferoj, sed pri la lingvo kaj movado mem: li instruis novulojn, montris la urbon Turku al vizitantoj, partoprenis en verkado de la societaj historiotoj kaj tradukis kaj kantojn kaj poemojn. En nia kantolibro Alaŭdo estas multaj kantoj tradukitaj de V.T. kaj ankaŭ esperantlingva teksto de la kristnaska pacdeklaro estas el la plumo de Veikko. Plej videbla por ĉiuj vizitantoj en Turku estas la poemforma sentenco de la skulptisto *Wäinö Aaltonen* en la samnoma muzeo: sur la muro en la enira halo staras ekde la jaro 1995 la teksto ankaŭ Esperante kaj la tradukon faris Veikko Tikkanen. Li estis surloke, kiam oni ĉizis la tekston sur la muron por certigi ke ĉiu detalo estos en ordo. La tekston vi trovas en Esperantolehti 1/2014.

Kara Veikko, dankon pro ĉio, kion vi dum jardekoj faris por Esperanto, por nia societo kaj por ni ĉiuj. Vi restas en nia memoro, dormu trankvile.

Suurkiitos Veikon omaisille lämminhenkisestä muistotilaisuudesta Sinisessä kammarissa. Oli hienoa muistella yhdessä Veikon vaiheita ja kertoa hänen esperantoelämästään.

*Por Esperanto-Societo en Turku,
Tiina Oittinen, prezidanto*

Esperanto-societo en Turku informas

Esperanto-societo en Turku (EST) havis la laŭstatutan jarkunvenon 31-an de januaro 2016 en la kunvenejo de Civitana instituto de Aurala.

Elektitaj funkcioj: *Tiina Oittinen*, prezidanto, *Anna-Liisa Ali-Simola*, vicprezidanto, *Leena Tiusanen*, sekretario, *Paula Niinikorp*, librotenisto, kasisto kaj estrarvicmembro. Aliaj

estrarmembroj: *Paula Harju*, *Anja Launiainen*, *Eeva Nikoskelainen* kaj *Kari Pyykkö*; vicmembroj *Merja Uotila* kaj *Veikko Tikkanen* (forpasis en februaro). Agadkontrolantoj: *Orvo Haavisto*, vice *Ilpo Forsström* kaj honore *Jorma Ahomäki*.

Printempe kaj somere ni daŭre kunvenas pli-malpli regule merkrede en la kafejo *Sirius* de la ĉefbiblioteko. Kiel ekskursoj estas pla-

nitaj vizito en arta muzeo de Turku aŭtune kaj same vizitoj al la aliaj urbaj muzeoj. Niaj esperantlingvaj ĉiĉeronoj gvidas vin. Gastoj estas ĉiam bonvenaj. Informiĝu ĉe EST-anoj pri datoj, kontaktuloj: sekretario de EST Leena Tiusanen (tel. 050-5757956, leena.tiusanen@elisamet.fi) aŭ al prezidanto Tiina Oittinen (tiina.oittinen@pp.inet.fi, tel. 050-5494709).

Vidu la vidindaĵojn de la urbo ankaŭ Esperante en la reta broŝuro sur la paĝo visitturku.fi

Turun Esperanto-yhdistyksen hallituksen jäsenet näiet esperantokielisestä osuudesta. Tapaamme keväällä ja kesällä lähes viikottain keskiviikkoisin

pääkirjaston kahvila Siriuksessa noin klo 16.30-17.30. Muita tapaamisia ovat vierailut yhdistyksen esperantokielisten oppaiden kanssa kaupungin eri kohteisiin, mm. taidemuseoon ja muihin kaupungin museoihin. Vierailijat tervetulleita, varmista kuitenkin aika ja paikka! Lisätietoja joko siht. Leena Tiusaselta, puh. 050-5757956, leena.tiusanen@elisamet.fi tai pj Tiina Oittiselta, tiina.oittinen@pp.inet.fi tai puh. 050-5494709.

Lue kaupungin nähtävyyksistä myös esperantoksi nettiesitteestä, joka on matkailutoimen visitturku.fi sivulla. Matkailutoimi seuraa kiinnostusta nettiesitteeseen, joten kannattaa käydä avamassa se.

EAF kunvenis en Hämeenlinna

La urbo Hämeenlinna distancas trajne aŭ buse je unu horo norden de Helsinki, same kiel Lahti nordorienten. Lastenomitan urbon necesas menciĉi, ĉar ĝi estas menciita en la agadraporto kaj -plano aprobitaj en la jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando 12.3.2016 en Hämeenlinna: Se UEA akceptos la oferton de EAF kaj Lahti, la 103-a UK okazos tie en 2018.

La jarkunveno reelektis Tuomo Grundström prezidanto de la asocio, kaj la estraro nur ete ŝanĝiĝis: Kiel estraranoj por la jaroj 2016–2017 estis elektitaj *Tiina Kosunen*, *Paula Niinikorpi* kaj *Robert Bogenschneider*. Sen reelekto restis la estraranoj *Arja Kuhanen*, *Tiina Oittinen* kaj *Päivi Saarinen*. Kiel vicestraranoj por la jaro 2016 estis elektitaj *Tapani Aarne*, *Börje Eriksson* kaj *Andrei Dumitrescu*. La kunsido dankis al *Tuomas Latva-Pirilä*, kiu nun lasis la estraron.

Tiina Oittinen kaj *Onni Kauppinen* memorigis

pri la somera kurso en *Iisalmi* (en oriento) 14.–17.7. kaj bonvenigis ĉiujn partopreni. *Aini Vääräniemi* bonvenigis ĉiujn al la sekvaj Aŭtunaj Tagoj, kiuj okazos 24.–25.9. en *Taivalkoski* (en nordo). *Sylvia Hämäläinen* prezentis la librokonlektion prunteblan tute aŭ parte por reklami Esperanton en diversaj eventoj. La kolekto troviĝas ĉe Paula Niinikorpi en *Pori* (en okcidento).

En Hämeenlinna naskiĝis kaj kreskis la eble plej famkonata Finnlandano, la komponisto *Jean Sibelius* (1865–1957). Ni ĝuis brilan prezenton kun muzikspecimenoj de la direktoro de la jubilea jaro, pianisto *Erkki Korhonen*, kaj gvidadon tra la urbo kaj en la naskiĝdomo de la komponisto. Sabatvespere bele amuzis orienteca dancogrupa kaj juna magiisto. – Glatan lokan arangadon ni dankas al *Marjatta Niemi* kaj *Kati Lindell*.

Tuomo Grundström

Profundan dankon

pro viaj kondolencoj kaj honoresprimoj okaze de la forpaso de mia patrino Carola Antskog. Specialan dankon pro la donacoj al Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors honore al *Carola Antskog* de *Synnöve Mynttinen*, *An-*

neli Hansen, Esperantoklubo de Salo, *Lennart Svensson* kaj *Douglas Draper* kaj pro ĉiuj esprimitaj rememoraĵoj.

Anna Ritamäki-Sjöstrand

Invito al festo por la vivo

La Esperanto-klubo de Lahti antaŭ kelkaj jaroj jam ĉesis esti registrita asocio, tamen ankoraŭ en la kaso restas iomete da mono. Kelkaj el la "veteranoj" de la asocio ekpensis pri ebla uzo de tiu mono, ankoraŭ antaŭ ol ĉiuj jam forlasos ĉi tiun mondon. La zorgo pri la estonteco de esperanta agado en la regiono de Lahti estas granda. Speciale por tiuj kiuj dum multaj jaroj aktivigis dum klubaj renkontiĝoj, dum multaj jaroj kun multaj partoprenantoj estas malfacile akcepti, ke tiaj renkontiĝoj ne plu eblas. La situacio estas la sama en multaj landaj asocioj. La tempoj ŝanĝiĝis – ĉu tio signifas, ke la bela sonĝo de la homaro ĉesos? Esperanto certe ne malaperos, kvankam temas pri krizo profunda kaj la tuta esperantomovado bezonas renoviĝon. La evoluo de la ciferecaj kaj retaj komunikiloj ebligas al homoj rilati tute alie ol antaŭe, la organizoj kaj tradiciaj renkontiĝoj kaj kongresoj evoluos certe iel en novajn formojn. Kiel frue estis, ne plu estos; kio okazos, nur estontaj esperantistoj vidos. Ĉu ni povas influi la evoluon?

Ĉiu esperantisto estas individuo kun siaj propraj preferoj kaj eblecoj agi kun la komuna lingvo. Por mi la plej granda ĝojo estas, malgraŭ tio, ke mi ne multe vojaĝis eksterlande, ke mi tamen trafis multajn homojn el multaj landoj kaj diversaj kulturoj, vive kaj tra legado, el libroj kaj en la reto. Mi tamen volas ĉi tie atentigi pri kelkaj aferoj kiuj laŭ mi bezonas plibonigon, se Esperanto interusu pli da homoj.

Ĉar mi ĉiam interesiĝis pri diversaj sociaj vivkonceptoj, ankaŭ la homarana ideo de Zamenhof malantaŭ Esperanto estis kaj estas grava por mi, kvankam mi scias, ke oni bone povas esti esperantisto sen pli grandaj zorgoj pri la interna ideo. Esperanto ja estas lingvo por universala homa agado, rilate al kaj materia kaj spirita kulturoj. Ofte tamen mi sentis, ke pli profundaj spiritaĵoj de la vivo ne ri-



cevis sufiĉan atenton en la esperanto-movado, oni kvazaŭ ĉiam volas esti neŭtrala kaj ne tuŝi aferojn kiuj povas vekti kontraŭajn sentojn inter amikoj. Tio havas kaj pozitivan kaj negativan efikojn: oni evitas konfliktojn, sed samtempe oni ne klarigas diversajn vidpunktojn. Kaj tiam estiĝas malkompreno inter homoj, en plej malbona kazo estiĝas antaŭjuĝoj kaj eĉ malamikeco. Do, la malo al la celo de Esperanto. Ĉar la homa lingvo rilatas al ĉio en la homa vivo, la tuteco devus klare estiĝi el la diversaj "fakaj" vidpunktoj, se la argumentoj kaj analizoj estas klaraj. Bedaŭrinde ili ne ĉiam estas klaraj por ni mem! Tiam la tuteca kaj la universaleca kialoj de Esperanto por la ekstera publiko ŝajnas esti nur turistaj kaj amuziĝaj eventoj. Eble oni ankaŭ scias, ke la esperantistoj ankoraŭ sonĝas pri komuna lingvo por la homaro, sed ke Esperanto estas reala eblo servi al la bono de la homaro, tion nur malmultaj povas kompreni. Tial ni devus pli profunde plibonigi la konscion pri la homo mem, ĉar unuavice esperantistoj estas homoj. Post tio sekvu argumentado kaj konscio pri la valoroj de Esperanto.

La por mi plej grava malkovro estas konatiĝo kun la verkoj de la dana verkisto *Martinus*. La unuan fojon mi aŭdis pri li dum la UK 1995 en Tampere, kiam mi ankoraŭ ne tre grave interesiĝis, sed la semo kreskis kaj nun ekde kelkaj jaroj mi multe studis liajn verkojn. Fakte mi tre miras, ke ne pli multaj esperantistoj interesiĝis pri lia kosmologio malgraŭ tio, ke signifa parto de liaj tekstoj haveblas en Espe-

ranto. La plej granda obstaklo certe estas, ke homoj timas, ke Martinus estas iu mistika afero simila al aliaj ofte en Esperantujo aperantaj spiritismaj kaj religiaj dogmoj, kiuj ofte baziĝas sur blinda kredo al diversaj aŭtoritatoj, ĉu tradiciaj organizitaj religiaj komunumoj, ĉu aliaj piuloj. Martinus ne tiujn kondamnas, ili siatempe havis spiritan taskon, tamen por nia tempo adekvatan mondbildon Martinus malfermis per tute novaj perspektivoj kaj li ankaŭ racie klarigas multajn malfacile kompreneblajn bibliajn aferojn, tiel ke moderna homo, ankaŭ nekredanto, povas kompreni ilian historian rolon en la spirita evoluo de la homaro.

Kio do estas la speciala kun la mondbildo de Martinus? Unue ĝi estas ege ampleksa mondbildo, samtempe tre logika kaj facile komprenebla. Martinus klarigas la leĝojn ne nur de la materia mondo, sed li ankaŭ analizas la spiritan mondon same science. Lia mondbildo estas ege pozitiva, do li donas tre grandan konsolon kun tute novaj vidpunktoj, al la ĉefaj malfacilaj demandoj, kiujn la homo renkontas dum sia vivvojaĝo, aŭ fakte siaj vivvojaĝoj, ĉar Martinus montras, ke reenkariniĝo estas fakto kaj la vivo estas eterna, do morto estas nur portempa aferstato kaj eĉ sufero kaj krizoj servas al evoluo kaj perfektigi de la homo...

Sed, mi ne pli klarigu, vi povas mem rigardi en la reto, se tio interesas vin, ekzemple en la hejmpaĝoj de la Martinus-Instituto: www.martinus.dk/eo/titolpago/. Troveblas multaj esperantlingvaj Kosmos-gazetoj ([www.marti-](http://www.martinus.dk/eo/la-revuo-kosmos/elsutebla-esperanto)

-kosmos). Oni povas legi kaj aŭskulti multajn prelegojn kaj tekstojn ĉefe en la originala lingvo, la dana aŭ en la sveda. Dume tamen aperas pli kaj pli da tekstoj kaj videoj ankaŭ en aliaj lingvoj. Esperanto estas oficiala lingvo de la Martinus-Instituto. Tio estas plia kialo interesiĝi pri la ideoj de Martinus rilate al la estonteco de la homaro kaj komuna lingvo de ĝi.

Sed nun al la ĉefa demando de ĉi tiu mesaĝo, kiu precipe koncernas la lahtianajn esperantistojn, sed fakte ankaŭ estas invito al ĉiuj kiuj interesiĝas pri revivigo de spiritaj idealoj, kiuj estas la bazo de la esperantomovado. Mi pensas, ke la mondbildo de Martinus bone kongruas kun la homarana idealo en moderna, intelekta komprenebla formo.

Ĉu vi volas renkontiĝi por festi la vivon, antaŭ ol la portempa morto distingos nin unu de la alia? Krom alia programo, manĝo kaj pensoj pri estinta kaj estonta esperantovivo en Lahti, mi pretas rakonti iomete pri la vivo kaj kosmologio de Martinus. Eble tio povas esti komenco al io nova daŭripova, almenaŭ al nova perspektivo al nunaj problemoj en la vivo. Por partopreno neniu religia aŭ scienca scio estas bezonata, nur iomete da neantaŭjuĝa sinteno estas necesa. Eble ni tiel eĉ povas iomete plilongigi nian komunan surteran tempon pere de pozitivaj pensoj de Martinus?

Sed kie kaj kiam ni renkontiĝu? Kontakto min, se vi interesiĝas pri la afero.

Amike,

Börje Eriksson
esperarto@phnet.fi

Esperanto-societo Antaŭen informas

Someraj renkontiĝoj komenciĝos la 30-an de Majo je la 17–18 en la kafejo de la ĉefbiblioteko "Metso" en Tampere. Ili daŭros la tutan someron, kaj la lasta renkontiĝo okazos la 29-an de Aŭgusto. Iun estraronon vi

renkontas en Nesto, nia klubejo, ĉiujn lundojn je la 16–17. – Bv. vidi pliajn informojn pri la agado en somero ĉe la retejo www.esperanto.fi/tampere

Estraro

Aĉetebla ĉe EAF – libroj ja "fanituoteita"

Sendu la mendojn al: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, aŭ retpoŝte: eafmendoj@esperanto.fi. Bv. menci i vian nomon, adreson kaj retpoŝtan adreson.

Esperanto mutkattomasti (Lernolibro de <i>Stano Marček</i> en multaj tradukoj).....	10 €
ELFI-libro (Pri la 90-jariĝo de ELFI, de <i>Sylvia Hämäläinen</i>).....	5 € (membroj) aŭ 10 € (aliaj)
Poŝvortaro Finna-Esperanto-Finna (<i>Joel Viikki</i> kaj <i>Heljä Favén</i> ; Baza vortaro, la plej kompleta vortaro finna-Esperanto).....	10 €
<i>Lars Forsmann</i> : Egaleco kaj paco per Esperanto (Lernolibro, finnigita de <i>Raita Pyhälä</i>).....	10 €
<i>J.C. Wells</i> : Jen nia mondo 2 (Lernolibro por finnoj, finne redaktis <i>Silja Kivekäs</i> ; bona kiel legolibro kaj por ekzerco kaj ripeti tion, kion instruas la unua parto).....	8,50 €
Kalevala (Esperanta traduko de la finna nacia epopeo. Perlo de la tradukita poezio.	
Kompilis <i>Elias Lönnrot</i> (1835, 1849), esperante tradukis <i>J.E. Leppäkoski</i> . Dua eldono en 1985).....	10 €
Kalevala numerita (La sama, sed numerita eldono):	67 €
Kalevala luksa (Tola bindaĵo kaj ora flanko):	100 €
<i>Tove Jansson</i> : Muminvalo (Esperanta traduko de la svedlingva originalo <i>Det osynliga barnet och andra berättelser</i> . Infanlibro, sed ne nur por infanoj. Tradukis <i>Eckhard Bick</i> . Dua eldono de 1993).....	12 €
<i>Eija Salovaara</i> : Kie boacoj vagadas (Novelkolekto de Helsinki-a aŭtorino pri Laponio. Dua eldono en 1995).....	12 €
Proverbaro – Nia komuna heredaĵo (Pli ol 3700 proverboj el la tuta mondo kolektitaj kaj tradukitaj de <i>Erkki Röntynen</i>)	14,50 €
Blanka kafotaso kun verdaj emblemoj <i>Esperanto – Lingvo internacia</i>	10 €
Surkudrebila plako kun brodita teksto <i>Esperanto – Lingvo internacia</i>	2 €
Pendaĵo farita el du plakoj, duflanke brodita teksto <i>Esperanto – Lingvo internacia</i>	5 €
Arĝenta pinglo, produktita de Hetta Silver Oy	12 €
Arĝenta broĉo, produktita de Hetta Silver Oy.....	30 €
DVD Esperanto Elektronike (prezentas Esperanton per kursoj, vortaroj, fotoj, filmo ktp. La menuoj kaj granda parto de la informoj troviĝas ankaŭ finnlingve. Funkcias en novaj komputiloj, ne per portelevidaj DVD-ludiloj)	5 €
DVD "Esperanto" (Reĝisoro <i>Dominique Gautier</i> : Dokumenta filmo pri la mondo de Esperanto, kun subtekstoj en 22 lingvoj).....	18 €
LED-poŝlampeto.....	3 €
Metala globkrajono kun gravuraĵo <i>Esperanto – Lingvo internacia</i>	3 €

Laste aperis

Temas pri kolekto de 26 poemoj, verkitaj de 7 aŭtoroj en la triesta dialekto. Tradukis ilin triesta teamo konsistanta el Edvige Ackermann, Elda Doerfler kaj Anita Peric Altherr. La poemoj legeblas kaj en dialekto kaj en Esperanto.

Eld. Triesta Esperanto-Asocio. Okt. 2015. 70 p. Bind.

Kosto: € 12,00 plus sendokostoj.

Kontakt-adresoj:

esperantotrieste@yahoo.it aŭ testudo.ts@gmail.com



Kiam ekfloras la migdalarbo...
Quando fiorissi el mandorlo...

Indas kolekti juvelojn – Historio de la Esperanta literaturo

Eksterulo ne facile komprenas mian ĝojon, kiam loka leterportisto enmanigis al mi dikan leteron. Alvenis el Krakovo nova freŝa libro de la duopo *Carlo Minnaja* kaj *Giorgio Silfer*. Jam dum kelkaj jaroj mi legadis la brikforman verkon anglalingvan *Original Literature of Esperanto* de *Geoffrey Sutton* eldonitan en Nov-Jorko ĉe la eldonejo *Mondial*. Tute flue kaj plene digesteble malfermiĝas antaŭ miaj okuloj nun esperantlingva teksto produktita de *Kooperativo de Literatura Foiro*.

Ital-svisa laborgrupeto sukcesis bonege plenumi sian taskon. Kiam ajn la tempo permesas, estas al mi tre agrable re-eklegi altkvalitan fakan tekston ĉe kiu neniu restas indiferenta. Jam la unua foliumado de **Historio de la Esperanta literaturo** donis plaĉan aspekton kun riĉe ilustritaj paĝoj. Pli profunda konatiĝo substrekas prestiĝan valoron de la enhavo. Ni ja havas je nia dispono diversajn antologiojn, sed ĝis nun estis sentata manko de tutmonda faklibro pri esperanta literatura historio.

Jen ni havas valoregan verkon por montri al kiu ajn. Fortaj dubemuloj ne kapablas racie ar-

gumenti kontraŭ la grava signifo de nia literaturo. Kun geamikoj mi nepre tostos entuziasme pro tiu ĉi grandioza atingajo. Strange, ke mi havas la senton kvazaŭ sekvi aventurromanon, kvankam mi bone scias, ke temas pri referenca enciklopedio unuaklasa.

El la tempuzada vidpunkto mi estas 84-jara privilegiulo. Tute libere mi povas doni mian tempon por trovi surprizajn erojn en la libro. Eĉ flegistino en mia loka sancentro miris la brilon de miaj okuloj. Kompreneble mi mallonge klarigis al ŝi la kialon. Jam 57 jarojn mi velis sur la oceano de Esperanto. Iam kaj tiam literaturaj diamantoj povas naski ĝojegon. Pro tio mi devas esti kontenta kaj profunde dankema.

Indas mem legi la libron kaj rekomendi ĝin por kolektoj de lokaj bibliotekoj. Mia kompetento ne sufiĉas por recenzi ”ĉi tiun mian juvelon”, sed iom modifante mi imitas la verkiston *Cezaro Rossetti* kaj diras: ”Kredu min, sinjorino” kaj sinjoro!

*Entuziasmigan legemon deziras
Jorma Ahomäki en Turku, Finnlando.*

Medicinaj instru-filmetoj en Esperanto!

La retejo de ”Khan Academy” enhavas multajn centojn de sciencaj, edukaj kaj instruaj materialoj por libera klerigado. Antaŭ kelkaj semajnoj la kanada esperantisto *Matthew Orłowski* komencis traduki kaj subtekstigi kelkajn el ili al Esperanto, kaj laŭ la pozitivaj spertoj nun li komencis produkti proprajn filmetojn kun Esperanta voĉo.

La unua 9-minuta filmeto temas pri ”Enkondukaj konoj pri la funkciado de la koro”. Estas aldona ankaŭ la subteksto en E-o, se oni volas uzi ĝin.

La filmo estas trovebla en jutubo ĉe www.youtube.com/watch?v=hBpOgt5ldxs, kaj la ligilo kompreneble ankaŭ en la medicina sekcio de

STEB ĉe www.eventoj.hu/steb.

Gratulon al *Matthew Orłowski*, kiu anstataŭ nomumi sin (honora) prezidanto de iu Esperanta faka asocio komencis konkrete realigi fakan aplikadon. Volonte mi raportus pri apero de similaj materialoj ankaŭ en aliaj sciencaj branĉoj.

Szilvási László

P.S. Vortaroj, terminaroj kaj faka literaturo por diversaj sciencaj branĉoj estas troveblaj ĉe la interreta biblioteko STEB.

laŭ [Ret-Info / L.S.]

Nova redaktoro por la revuo "Esperanto"

El ses kandidatoj por sekvi *Fabrizio Valle* kiel redaktoro de la revuo 'Esperanto', la Estraro de UEA elektis *Attila Kaszás* (47). Li estas diplomita esperantologo, historiisto, politologo kaj li laboras en Budapeŝto kiel konsultanto kaj manaĝisto.

"Ni estas tre feliĉaj pri la kvalito de la homoj, kiuj proponis sin por tiu grava rolo", komentas la Prezidanto de UEA, d-ro *Mark Fettes*. "Denove nia komunumo montris, kiom da talentoj ĝi daŭre sukcesas nutri. La redaktoro estas ŝlosila ano de nia teamo en la Estraro kaj Oficejo, kaj mi antaŭvidas ke Attila plurflanke kontribuos al niaj laboroj por la renovigo de la Asocio."

Lerninto ĉe la fama kvintaga "Piratfiŝkurso" en 1987, Kaszás tuj aliĝis al la E-Fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto, kaj fariĝis tre aktiva en la junulara movado de la 90-aj jaroj. Estrarano de Hungara E-Junularo kaj TEJO, li kunorganizis multajn junularajn renkontiĝojn kaj trejnseminariojn, rolante kiel la LKK-prezidanto de la 55-a IJK. Dum

la renkontiĝoj li ofte verkis kaj reĝisoris humorajn skeĉojn kaj kunredaktis eldonaĵojn. Poste li fondis E-familion, en kiu naskiĝis unu filo.

Profesie, Kaszás laboris ĉe registaraj instancoj, NRO-oj kaj komercaj entreprenoj en diversaj kampoj, kiel ekz. junularpolitiko, ekologia mastrumado kaj internaciaj rilatoj. Li nun faras doktorajn studojn pri elektronika demokratio. Membro de la hungara UNICEF-komisiono kaj estrarano de la Asocio de Eŭropaj Baloto-Spertuloj, li krome ellernis pro pasio dek kvar lingvojn ĝis nun, kaj multe vojaĝis, entute en pli ol kvardek landoj.

Kaszás transprenos la redaktadon de la revuo ekde la maja numero ĉi-jare. "Dum la lastaj semajnoj mi konstante cerbumas pri la revuo, mi estas plena je ideoj, temoj, rubrikaj, artikoloplanoj", li entuziasmas. Jam en marto li planas viziti la Centran Oficejon por konatiĝi kun la kolegoj tie.

GK 607

Novajo el Kongo

Klubo la Amikoj de Esperanto, pri kiu aperis artikolo kun fotoj en Esperantolehti 5/2015 finprettigis sian lernejon. La plej grandan parton de la kostoj de 16.000 dolaroj ili mem perlaboris, kaj 4.000 dolarojn sendis alilandaj esperantistoj.

Ni daŭre helpu ilin, por ke ili povu havigi benojn por la lernoĉambroj. 200 benkoj estas bezonataj, po 50 benkoj por ĉiu klasĉambro.

Kontaktiĝu kun la lernejestro s-ro *Mana Brinson*, adreso: mana.esperanto.brinson@gmail.com, aŭ kun saliko@kase.fi.

Mana Brinson kaj Raita Pyhälä



Lernejo en Kongo

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@helsinki.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☒ onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 ☒ kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ☒ www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ☒ www.esperanto.fi/tampere (*Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi*) ☎ 050 5245 823)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 549 4709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☒ sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☒ steleto@pp.inet.fi
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☒ esperarto@phnet.fi.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliittoa, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2016

Nro	Limdato	Aperas
3/2016	31.5.	en junio
4/2016	1.9.	en septembro
5/2016	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoi

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 € 1/1 sivu/paĝo 50 €

1/2 sivu/paĝo 60 € 1/2 sivu/paĝo 30 €

1/4 sivu/paĝo 40 € 1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00530 Helsinki.



Posti Green

Muista maksaa jäsenmaksu ja varmistaa Esperantolehden tilaus

Suomen Esperantoliiton vuosikokous Hämeenlinnassa vahvisti henkilöjäsenen vuoden 2016 jäsenmaksuksi edelleen 22 euroa, maksu sisältää Esperantolehden tilauksen. Saat liitolta piakkoin jäsenmaksumuistutuksen tälle vuodelle. Kiitos, jos olet jo hoitanut maksun!

Mikäli tilaat Esperantolehden jonkin jäsenjärjes-

tön kautta, maksu on 16 euroa omasta lehdestäsi. Maksa lehti omalle järjestöllesi samalla kun hoidat jäsenmaksun sinne. Jäsenjärjestöjen yhteystiedot ovat takakannen sisäsivulla.

Lahjatilauksena lehden vuosikerta maksaa 25 euroa. Lisälehdillä sama hinta. Voit maksaa lahja/lisätilauksen joko liittoon tai jäsenjärjestösi kautta.

Toimi näin, jos haluat liittyä Suomen Esperantoliiton jäseneksi

Varmista jäsenjärjestötiedoista (takakannen sisäsivulla) paikkakunnallasi mahdollisesti toimiva jäsenjärjestö, ota yhteyttä ja liity sitä kautta. Jos jäsenjärjestöä ei ole, liity suoraan liiton henki-

löljäksi ja ota siinä tapauksessa yhteyttä liiton sihteeriin tai rahastonhoitajaan (tiedot s. 2). Ilmoita osoitteesi ja muut tietosi niin saat maksuohjeet. – Tervetuloa mukaan!

Memoru la membrotizon kaj reabonon de Esperanta Finnlando

La jarkunveno de EAF konfirmis, ke la membrotizo de individua membro por la jaro 2016 estas 22 eŭroj. La kotizo inkluzivas abonon de la gazeto Esperanta Finnlando. Vi ricevos baldaŭ memoriĝon pri la kotizo por tiu ĉi jaro. Dankon, se vi jam pagis ĝin!

Se vi abonas la gazeton tra iu membrosocio de EAF, la pago estas 16 eŭrojn por via propra gaze-

to. Pagu la abonon al via asocio kune kun la membrotizo laŭ la instrukcioj de via asocio. Vi trovas la kontaktinformojn de la membrosocio sur la antaŭlasta paĝo de ĉiu gazeto.

Se vi deziras fari donacabonon aŭ mendi kromajn gazetojn por via uzo: la abono estas tiam 25 eŭrojn. Vi povas pagi aŭ al EAF aŭ tra via membrosocio.

Se vi volas membriĝi en Esperanto-asocio de Finnlando

Kontrolo sur la antaŭlasta paĝo de la gazeto, ĉu troviĝas membrosocio en via regiono, kontaktiĝu kun ili kaj membriĝu laŭ instrukcioj de la asocio. Se tia ne ekzistas, membriĝu kiel individua mem-

bro de EAF. Informu vian nomon kaj adreson al EAF (sekretario aŭ kasisto) kaj vi ricevos pliajn sciojn pri pago ktp. Kontaktinformoj estas sur la paĝo 2. Bonvenon!

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Aineisto 31.5.2016 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en junio. Artikoloj ĝis 31.5.2016 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehdi/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: eafgazeto@esperanto.fi.